

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 15.2.2012

Aktuala Dekamerono

Zdeněk Závodný

Giovanni BOCCACCIO (1313-1375), la fama itala novelisto, estas samtempulo de nia Patro de la Patrujo, la Bohemia reĝo Karolo la Kvara.

G. Boccaccio naskiĝis en la jaro 1313 kaj la Karolo la IV-a 3 jarojn poste 1316, la 14-an de majo je la kvina matene, kiel skribas s-ano Vondroušek. G. Boccaccio mortis en la jaro 1375 kaj reĝo Karolo 3 jarojn poste en la jaro 1378, la 29-an de novembro, do ambaŭ en aĝo de 62 jaroj. Ambaŭ estis eksterordinare saĝaj homoj, sed ilia kariero estis tute malsama.

Karolo la IV-a estis saĝa reganto.

Kiam li estis 18-jara, en la jaro 1334 li ricevis de sia patro Johano titolon de la markgrafo Moravia.

Kiam li estis 25-jara, en la jaro 1341, li estis akceptita de la Bohemia parlamento kiel estonta reĝo kaj li ankaŭ fabrikigis novan Bonemian reĝan kronon (1346).

Kiam li estis 30-jara, li estis elektita kiel Romia reĝo, en la jaro 1346 - en la sama jaro en la batalo apud Crécy heroe mortis lia patro Johano kaj Karolo fariĝis Bohemia reĝo kaj li estis ankaŭ kronita kiel Romia reĝo en Bonn. Unu jaron poste la 2-an de septembro 1347 okazis en PRAGO KRONADO de KAROLO kaj Blanka per la nova krono. Post la kronado li fondis la Pragan Universitaton la 7-an de aprilo 1348.

Kiam li estis 39-jara, la 6-an de januaro 1355 Karolo estis kronita kiel la reĝo de Lombardio kaj nur tri monatojn poste la 5-an de aprilo li estis kronita kiel Romgermana imperiestro. La 29-an de novembro 1378 Karolo la IV-a mortis je pulmonito, super lia ĉerko oni unufoje nomis lin „Patro de la Patrujo“. Li faris Pragon unu de centroj de la Eŭropa kulturo, kun lia nomo estas ligitaj tiaj monumentoj kiel la kastelo KARLŠTEJN (1357), la Nova Praga Urbo, grandioza Karola ponto trans la rivero Vultavo kaj renovigo de la Bohemiaj reĝaj juveloj (krono, sceptro, globo) el oro kaj gemoj. Li estis ne nur saĝa reganto, sed ankaŭ homo tre pia kaj profunde kredanta, kiu sian surteran vivon opiniis nur preparo por la vivo eterna.

Nun pri Giovanni Boccaccio, li kiel novelisto esprimas sin tre ironie pri religio, li eĉ primokas la vivon de sanktuloj, de monaĥoj, de monaĥinoj kaj pastroj -

pro tio estis por mi eĉ mirinde, ke la Katolika eklezio tion toleris, ke li ne estis kondamnita kiel herezulo al morto kaj bruligita viva, kiel nia Jan Hus, kiu entute eklezion ne parodiis, nur kritikis mankojn, speciale monavidecon kaj vendojn de indulgencoj al kredantoj.

De la verkaro de G.B. mi elektis la plej faman, la DEKAMERONON, kiu entenas cent novelojn, rakontitaj en dek tagoj de sep damoj kaj tri junuloj.

La tradukon en E-on komencis Gaston Waringhien, 20 paĝojn semajne, do li la boris ĉiutage ĝis profunde de la nokto. La celo estis traduki la unuajn tri tagojn, tio signifas 30 novelojn. La tradukadon interrompis la dua mondmilito, en kiu pereis Vilmos Bleier, la ĉiofara spirito, do poste ĉio ekdormis.

Tajpitajn kopiojn revokis s-ino Perla MARTINELLI, kiu prenis ankaŭ la ŝarĝon de la editorado de la verko kaj samtempe tradukis la lastajn novelojn.

La verko DEKAMERONO - La Unuaj Tri Tagoj estis en E-o eldonita en la jaro 1995 en Svislando.

Do el tiuj 30 noveloj mi elektis unu por iomete amuzi vin, do aŭskultu kaj ridu plenbuŝe!

Nu! pri kio temas. Fraŭlino Alibek, en teritorio de la hodiaŭa Tunizo, fariĝis ermitino kaj monaĥo Rustiko instruas al ŝi reinferigi la diablon.

Karaj s-aninoj, eble vi neniam aŭdis kiel oni remetas la diablon en inferon, do mi tion malkaŝos al vi! Do, atentu bone! En la urbo Kapso, hodiaŭ urbo Gafsa en Tunizio, vivis iam tre riĉa viro, kiu inter aliaj gefiloj havis filinon belan kaj tre delikatan, laŭnome ALIBEK. Ŝi ne estis kristana, sed aŭdis multajn kristanojn, kiuj loĝis en la urbo, laŭdi la kristanan kredon kaj la servadon al Dio. Do ŝi iam demandis unu el la kristanoj, kiamaniere oni plej konvene povus servi al Dio. Kaj li respondis, ke plej bone servas Dion tiuj, kiuj rifuzas la mondaĵojn, ĉiuspecajn amuzojn ktp., do plej bone servas al Dio la homoj, kiuj vivas askete en la soleco de la Tebaidaj dezertoj.

Do, la junulino, estante apenaŭ dekkvarjara kaj tre naiva, puŝita de infaneca scivolo, la sekvantan matenon tute sola ekmarŝis kaŝe al la Tebaida dezerto kaj kun granda peno, post kelkaj tagoj venis al tiuj solecaj lokoj.

Vidinte en la foro dometon, ŝi direktiĝis al ĝi, kaj sur la sojlo renkontis sanktulon, kiu tre miris pro ŝia ĉeesto, demandis kion ŝi serĉas. Ŝi respondis, ke pro Dia inspiro, ŝi volas sin dediĉi al Dia servo kaj pro tio serĉas konvenan instruon.

La saĝulo, vidante ŝin juna kaj tre bela, kaptita de la timo, ke la demono lin povus tenti, se li ŝin retenus - do, li laŭdis ŝian bonan intencon kaj nutrinte ŝin per iom da sovaĝaj pomoj kaj per akvo, diris: „Filino mia, ne longe de ĉi tie vivas sanktulo, multe pli bona majstro ol mi pri tio, kion vi serŝas - do iru al li, kaj li montris la vojon. Ŝi iris kaj venis al la kabaneto de juna ermito, homo tre pia kaj bona, kies nomo estis RUSTIKO. Li ne sendis ŝin for, sed retenis ŝin ĉe si en la ĉelo; kaj kiam noktiĝis, faris por ŝi en angulo liteton el palmaj branĉoj kaj diris, ke sur ĝi ŝi ripozu.

Post tio, la tentojn de diablo eksturmis la forton de la junulo, kiu post ne multaj atakoj ĉesis batali kaj kapitulacis, kaj komencis cerbumi kiel agi kun ŝi, por ke ŝi ne konsciis, kion li deziris de ŝi.

Per kelkaj demandoj li eksciis, ke ŝi neniam konis viron kaj estas senmezure

naiva - do li elpensis kiel, ŝajnigante servon al Dio, li povus ŝin submeti al siaj plezuroj. Per multaj vortoj li montris al ŝi kiom la diablo malamikas al la Eternulo kaj pro tio necesas repuŝi diablon en la inferon, al kiu la Eternulo lin damnis.

La junulino demandis, kiamaniere oni metas la diablon en inferon, kaj RUSTIKO respondis: „Nu, vi baldaŭ ekscios, unue vi faru tion, kion vi vidis min fari“ kaj li komencis formeti la malmultajn vestojn, kiujn li havis, restante tute nuda, kaj tiel agis ankaŭ la knabino. Do ne miru, ke ĉe Rustiko pro la spektaklo de tioma beleco, okazis RESUREKTO de KARNIO, kiel ni kristanoj pie diras, kaj Alibek demandis, Ho, Rustiko, kio estas tiu aĵo, kiun mi ne havas kaj ĉe vi tiel elstaras kaj rigide tenas sin kiel kandelo? - Ho filino, diris Rustiko, Tiu ĉi estas la DIABLO, pri kiu mi parolis, kaj vi vidas, ke nun tre turmentas min, tiom ke mi apenaŭ povas ĝin elteni.

„Ho, laŭdu Dion, diris Alibek, ke mi fartas pli bone ol vi, ne havante tian diablon: Nu jes, diris Rustiko, vi pravas, sed vi havas ion alian! - Ho, ĉu vere, kion? demandis Alibek. Nu, vi havas la INFERON kaj ni povas remeti tiun mian diablon en vian inferon kaj per tio ni faros grandegan servon al Dio!

Tion dirinte, kaj portinte la junulinon sur unu el la litetoj, li instruis al ŝi, kiel oni devas agi por enkarcerigi tiun diablon.

La junulino, kiu neniam antaŭe reinferigis ajnan diablon, la unuan fojon sentis iom da ĝeno kaj diris, vere ankaŭ la infero mem portas suferon, kiam oni remetas tiun diablon enen.

Rustiko kvietigis ŝin per vortoj: „Nu, filino, ne ĉiam estos tiel“ kaj vere la ludo al ŝi ekplaĉis kaj ŝi diris: „Ho, mi ne memoras, ke io alia tiel plezurigis min, kiom remeti la diablon en la inferon“.

Kaj per tiu Dia servo kaj vervo, ŝi tiom lin konsumis, ke li komencis paliĝi. Nu, certe Rustiko, kiu vivis nur per akvo kaj herbaj radikoj, apenaŭ povis regi la ĉiutagan fortostreĉan ludon.

Do, finfine Rustiko forsendis la knabinon al ŝia patro, ĉar ŝi jam multege servis al Dio.

Alibek reveninte hejmen edziniĝis al junulo Neerbalo kaj estis surprizita, ke tiun servon al Dio oni faras bone ankaŭ hejme.

Kaj kiam foje ŝiaj scivolemaj amikinoj demandis, kion ŝi faris kaj lernis en la dezerto ĉe tiuj monaĥoj, ŝi ĉiam senhezite respondis: „Ĉefe mi lernis, ke pli bona estas praktiko ol centhora prediko.“

Fino punkto, dankon por via atentemo!